



IΦ-Sophia

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

Artigos

Novaj tendencoj en la hodiaŭa Esperanto

Por: Luiz Fernando Dias Pita¹

magisterpita@gmail.com

Resumo:

Publikita kiel internacilingva projekto en 1887, Esperanto evoluis lingve, kaj havas hodiaŭ aktivan komunumon da parolantoj, esprimiva literaturo, kaj ĝi ankaŭ estas disvastigilo ne nur de diversaj kulturoj, sed ankaŭ akuŝas sian propran. Pli ol tio, Esperanto estas lingvo en transforma procezo kaj, laŭlonge de tiuj preskaŭ 130 jaroj de ĝia ekzisto, jam estas eble rigardi ŝanĝojn stabligitajn, kaj novajn tendencojn en la hodiaŭa Esperanto.

Ŝlosilvortoj: Esperanto – Lingvistika Evoluo – Planitaj lingvoj

Resumo:

Publicado como projeto de língua internacional em 1887, o Esperanto evoluiu como língua e possui hoje uma ativa comunidade de falantes, uma expressiva literatura e é veículo não só de diversas culturas, mas encuba a sua própria. Mais que isso, é uma língua em transformação e, ao longo de quase 130 anos de existência, já é possível se detectar mudanças estabelecidas e novas tendências no Esperanto “contemporâneo”.

1 É Doutor em Letras Clássicas pela Universidade Federal do Rio de Janeiro – UFRJ, Mestre em Letras Clássicas pela Universidade Federal do Rio de Janeiro – UFRJ, Mestre em Letras pela Universidade Federal Fluminense – UFF, Especialista em Língua Latina pela Universidade do Estado do Rio de Janeiro – UERJ e Graduado e Licenciado em Letras Português-Espanhol pela Universidade do Estado do Rio de Janeiro – UERJ. É pesquisador-efetivo e Coordenador de Pesquisa do Grupo de pesquisa Filosofia, Ciência e Tecnologia – IFPR.



IΦ-Sophia

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

Palavras-chave: Esperanto - evolução linguística; Línguas planejadas.

Resumen:

Publicado como proyecto de lengua internacional en 1887, el Esperanto evolucionó como lengua, y posee hoy una activa comunidad de hablantes, una expresiva literatura y es vehículo no sólo de diversas culturas, sino que es la cuna de su propia. Más que éso, es una lengua en transformación y, a lo largo de sus casi 130 años de existencia, ya es posible detectarse cambios consagrados y nuevas tendencias en el Esperanto “contemporáneo”.

Palabras-clave: Esperanto - Evolución lingüística - Lenguas planificadas

Unu el la unuaj premisoj de la Lingvistiko estas ke ĉiu lingvo evoluas dum la tempopaso laŭ la bontrovo de siaj parolantoj, kiuj estas ĉionpovaj, eĉ se nekonsciaj, rilate al la vojoj sekvotaj de la lingvo. Do, ĉiu lingvo ŝanĝiĝas, kaj en tio estas nenia problemoj, ĉar estas natura procezo. La problemoj ja ekas kiam tio ne plu okazas, ĉar tio anoncas lingvon baldaŭ mortontan: bona ekzemplo por tio estas la evoluo de la latina lingvo, kiu estis uzita - en la skribado - de la 1-a ĝis la 5-a jarcentoj pK strikte laŭ la modelojn starigitajn dum la 1-a jarcento aK; rezulte, estis momento kiam preskaŭ neniuj plu kapablis kompreni la skribitan lingvon, kaj oni ekkomencis kredi ĝin mortinta, kvankam ĝi ankoraŭ estis parolata en preskaŭ tuta Eŭropo kaj Norda Afriko.

Kompreneble, tiu supra aksiomo ne estis pensita

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

konsiderante artefaritajn lingvojn; sed fakto estas, ke ankaŭ ili, se vivantaj, estas subigitaj al tiu evolua procezo. Konsekvence, Esperanto, kiel vivanta lingvo, neniel estas, kaj neniam estos, imuna al tiu evoluo. Estas grave tuj distingi inter "evoluo" kaj "reformo": ĉiu lingva evoluo okazas nepercepteble, kaj nur per kontrastiga komparado inter parolturnoj, skribmanieroj kaj prononco de samlingvanoj el malsamaj generacioj aŭ devenlokoj oni sukcesas mezuri kiom longe tiun evoluon marŝis. Alie, reformo estas intenca ŝanĝo aŭ modifo en fiksitaj aspektoj de lingvo – motivitaj ĝenerale far eksterlingvaj kaŭzoj – tial, ĝenerale, la nuraj reformoj kiuj ja funkcias estas ortografiaj, ĉar tio estas simpla konvencio, ne fakte apartenanta al la idiomo mem.

Ekde siaj unuaj tempoj, Esperanto travivis tute naturan evoluon. Rimarkinda ekzemplo por tio estis la preskaŭa malapero de la apostrofado de la artikolo: tiel komuna ĝi estis en la unuaj jardekoj de la lingvo ke ĝi fariĝis la 16-an regulon de la gramatiko. Poste, oni estis restriktis ĝian uzon al lokigo post prepozicio finiĝanta en vokalo – "regulo" kiu aperas en la plimulto de la lernolibroj – kaj, en tria momento, al poeziaj tekstoj, kie oni povas ankoraŭ trovi ekzemploj de tiu uzo. Sed la lingvo ankaŭ estis viktimo de "reformismoj" kiuj plendis por diversaj ŝanĝoj en la idiomo, kies la plej kutima estis tiu, kiu batalis por la forigo de la "ĉapelitaj literoj". La malsukcesintaj provoj pacigi la konservatista kaj reformisma

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

grupoj rekte kondukis al la Ido-skismo, la unua, kaj ĝis hodiaŭ la plej granda kaj damaĝiga, el la okazintaj en Esperantujo.

Unu el la konsekvencoj de la Ido-skismo estis kreado, fare de Zamenhof, de la *Fundamento de Esperanto*, kies intenco kaj funkcio estas gvidi la evoluon de la idiomo kaj gardi ĝin kontraŭ ĉiu reformismo kaj dialektiĝo, eĉ se veninta el Zamenhof mem:

Ĝis la tempo, kiam ia por ĉiuj aŭtoritata kaj nedisputebla institucio decidis alie, ĉio, kio troviĝas en tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel deviga por ĉiuj; ĉio, kio estas kontraŭ tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel malbona, se ĝi eĉ apartenus al la plumo de la aŭtoro de Esperanto mem. Nur la supre nomitaj tri verkoj publikigitaj en la libro «Fundamento de Esperanto», devas esti rigardataj kiel oficialaj; ĉio alia, kion mi verkis aŭ verkos, konsilas, korektas, aprobas k.t.p., estas nur verkoj *privataj*, kiujn la esperantistoj – se ili trovas tion ĉi utila por la unueco de nia afero – povas rigardadi kiel *modela*, sed ne kiel *deviga*. (ZAMENHOF; 2015:20)

Esperantisto, ĝenerale, bone akceptas kaj respektas tiun pozicion prenintan de Zamenhof. Precipe post 1956, kiam Akademio oficiale konsideris ĝian *Antaŭparolon* kiel parto mem de la *Fundamento*, kvankam reformproponoj ankoraŭ sporade aperas, ili fakte kaŭzas nek pliajn disigojn en la esperanta movado, nek havas longan vivon. Tamen, rilate al defendo de la *Fundamento*, du malsimilaj sintenoj lante disvolviĝis, bazitaj specife sur du punktoj de la sama *Antaŭparolo*: laŭ la unua el ili, ĉio priskribita en la *Fundamento* aŭtomate malpermesas ian ajnan



IΦ-Sophia

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

novajon. Bazitaj sur la sekva citaĵo:

1) *Riĉigadi* la lingvon per novaj vortoj oni povas jam *nun*, per konsiliĝado kun tiuj personoj, kiuj estas rigardataj kiel la plej aŭtoritataj en nia lingvo, kaj zorgante pri tio, ke ĉiuj uzu tiujn vortojn en la sama formo; sed tiuj ĉi vortoj devas esti nur rekomendataj, ne altrudataj; oni devas ilin uzadi nur en la *Literaturo*; sed en korespondado kun personoj *nekonataj* estas bone ĉiam peni uzadi nur vortojn el la «Fundamento» ĉar nur pri tiaj vortoj ni povas esti certaj, ke nia adresato ilin nepre trovos en sia vortaro. Nur iam poste, kiam la plej granda parto de la novaj vortoj estos jam tute matura, ia aŭtoritata institucio enkondukos ilin en la vortaron *oficialan*, kiel «*Aldonon al La Fundamento*» (ZAMENHOF; 2015:22, subliniigo nia)

multaj esperantistoj agnoskas, ke Zamenhof rekomendis enkondukon de novaj vortoj nur en literaturaj tekstoj kaj rekomendis la ĉiutagan uzadon de "pure fundamentaj vortoj". Do, en leksika nivelo, oni perceptas ke tiu kontraŭneologisma sinteno kondukas al duobla situacio: estas tute malpermesate krei sinonimojn por fundamentaj vokabloj kaj, plej grave, enkonduki en la lingvon iaspecan neologismon - kelkaj eĉ defendas la simplan kaj tujan forigon de ĉiu ajn vorto nekonstanta en la Fundamento de Esperanto. Tiu grupo, eĉ se ĉiam ĉeesta - kaj bruema - en la esperanta movado, gajnis novan impulson ekde 1989, post la publikigo de *La Bona Lingvo*, libro de Claude Piron kiu, defendante ideojn proksimajn - sed ne tiel radikalaj - rapide fariĝis ilian standardon².

² Tiu grupo havas specialan forton en interreto, kies partopreno en sociaj

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

Kontraŭe al tiu radikala sinteno, estas alia, kiu ankaŭ agnoskas la netuŝeblecon de la Fundamento, sed ankaŭ ke, se la formo priskribita estas ja neŝanĝebla, tio entute ne malpermesas la aperigon de novaj, paralelaj formoj kiuj solvu novajn demandojn alportatajn al la idiomo de la sociaj, kulturaj kaj ceteraj ŝanĝoj en la mondo: tio estas, la "mavan lingvon" – laŭ la nomigo donata de Jorge Camacho – kiu ne nur defendas la riĉigon de la idiomo pere de novaj vortoj, laŭ ĝia neceso kaj utileco, kaj ankaŭ la konstanta uzo de la vortostoko jam ekzistanta kaj proponata en PIV, PAG kaj aliaj elstaraj libroj.

Tiu situacio alportas kuriozan konsekvencon al la instruado de la lingvo mem: se la bonlingvista sinteno ja faciligas la alprenadon de Esperanto fare de novlernantoj, siatempe ĝi baras – al tiuj kiuj progresas kaj pliprofundiĝas en la idiomo – la vojon al niaj plej elstaraj klasikaĵoj: malfacilas imagi tute puran bonlingviston kapabla plene legi kaj kompreni librojn kiel *La infana raso* aŭ *Fajro sur mia lango*, ĉar legado de tiuj verkoj ja postulos tutan relernadon de la lingvo. Ĝi ja kreas veran abismon inter la malsimilaj lingvaj niveloj kiuj estas necesaj por plena ĝuado de ĉiuj situacioj kiuj parolanto de lingvo povos travivi.

Kompreneble ankaŭ estas troigoj el la alia flanko: verkistoj kiel Karolo Piĉ kvazaŭ kreas propran lingvon,

retumoj kaj forumoj, faras el tiuj veraj koncentrejoj por ideoj. Defendante ke "oni devas nur uzi simplajn vortojn, por ne timigi la novulojn", fakte en tiuj lokoj bonaj konantoj de Esperanto ja estas raraj.



IΦ-Sophia

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

enkondukante novaj terminoj, vortoj, konjunkcioj, ktp. Sed tia sinteno, ĝis nun, funkcias nur kiel "aŭtora sigelo", kaj fakte ne tuŝas la hodiaŭan lingvon.

Tiuj-ĉi, kiuj ja estas la senbrua plejmulto el la movado, preferas atentigi la jenajn partojn de la sama antaŭparolo (ja longaj, sed necesaj citaĵoj):

Malgraŭ la severa netuŝebleco de la fundamento, nia lingvo havos la plenan eblon ne sole konstante riĉiĝadi, sed eĉ konstate *pliboniĝadi* kaj *perfektiĝadi*; la netuŝebleco de la fundamento nur garantios al ni konstante, ke tiu perfektiĝado fariĝados ne per arbitra, interbatala kaj ruiniga *rompado* kaj *ŝanĝado*, ne per nuligado aŭ sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo *natura*, senkonfuzaj kaj sendanĝera. (ZAMENHOF; 2015:22, subliniigo nia)

2) Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas *tro neoportuna*, ĝi ne devos *forigi* aŭ *ŝanĝi* la diritan formon, sed ĝi povos proponi formon *novan*, kiun ĝi rekomendos uzadi *paralele* kun la formo malnova. Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos *arĥaismo*, kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura lingvo. Sed, prezentante parton de la *fundamento*, tiuj ĉi arĥaismoj neniam estos elĵetitaj, sed ĉiam estos presataj en ĉiuj lernolibroj kaj vortaroj samtempe kun la formoj novaj. (ZAMENHOF; 2015:22-3)

Nu, konklude de ambaŭ citaĵoj, tiu grupo defendas ke oni ja povas alporti al Esperanto novajn vortojn, konceptojn kaj ideojn, kondiĉe ke tio ne disrompu la unuecon de la Fundamento³.

³ La unua grupo rebatas dirante ke Zamenhof kondiĉigis tiujn aldonojn al ekzisto de "aŭtoritata centra institucio", sen konsideri ke la Akademio de Esperanto estis fondinta en tiu sama bulonja kongreso, en kiu la Fundamento

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

Tamen, oni devas rimarki, ke tiu situacio solvas la "problemon" de la reformismo en Esperanto: oni ja povas bari troan neologismadon, fantazian enkondukon de novaj reguloj, ktp., sed neniel kapablas deteni la naturan evoluon de la lingvo.

Kaj tiu evoluo daŭrigis sian vojon, kaj ni povas ja percepti, komparante tiamajn kaj nunajn tekstojn, kelkajn etajn tendencojn. La unua el ili estis la progresiga forlaso de la romia numersistemo, do en la hodiaŭa Esperanto estas uzata nur la numersistemo hindaraba. (Oni povas eĉ pripensi eksteran kaŭzon por tio: konata de okcidentaj landoj, alproprigo de la romia sistemo fariĝis kroman – kaj vere komplikan – taskon por esperantistoj de aziaj kulturoj). Ekzemple: *La papo Benedikto La XV-a mortis en 1922; La XXVIII-a Universala Kongreso realiĝis en Vieno.* > *La papo Benedikto La 16-a renoncis en 2013; La 99-a UK okazis en Bonaero.*

Oni rimarkas ankoraŭ, ke, eĉ se kontraŭ rekomendon de la Akademio, estas klara preferado por la uzo de -io kiel "landnoma sufikso", flankenlasante "uj-on". Tiel, diversaj landonomoj kiuj, en la komenco de la 20-a jarcento rievigis kutime tiun lastan formon (Anglujo, Francujo, Hispanujo, Rusujo, ktp) ricevas hodiaŭ la sufikson "-io" (Anglio, Francio, Hispanio, Rusio). Nura escepto por tio estas la nomo "*Esperantujo*", kiu, eĉ se sentata kiel landa por la plimulto el la esperantistaro, fakte ne respondas al reala lando; sed estas kie la sufikso *uj*

estis lanĉita.

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

konservas sian plenan forton.

Fakte, nek la *Fundamento*, nek la Akademio de Esperanto sukcesas bone solvi tiun "landonoman demandon", starigante klaran, nediskuteblan, finan regulon kiu estu valida por landoj, regionoj, urboj ktp. (Certagrade, la situacio por personaj nomoj samas.) Malgraŭ ĝiaj rekomendoj, estas ankoraŭ granda konfuzo rilate al tiu temo, kaj tiu konfuzo fariĝas, kiel neĝrulaĵo, argumento por novegaj tendencoj, kiuj ni analizos poste.

Plia rimarko estas la silenta forlaso de la uzado de prefikso *ge-*. Tiel komuna ĝi estis por la unuaj esperantistoj, hodiaŭ apenaŭ aperas en kelkaj tekstoj, kaj tre rare oni aŭdas ĝin dum parolado, sed fakte, ekde *La Tuta Esperanto* (Seppik, 1934) la uzeblecoj de *ge-* jam montriĝis elĉerpitaj. En tiu libro mem, la aŭtoro taksis kondamninda la singularan uzon de tiu prefikso, en frazoj kiel: "*Ĉiu geano rajtas kunporti sian geparon.*", kio multe reduktis la ĉeeston de *ge-* en la ĉiutaga lingvo, kaj ĝi iel sekvas la vojon de *bo-*, hodiaŭ frostita en determinita vortogrupo. Tamen, la malapero de *ge-* estas parto de alia situacio, esplorota antaŭen.

Alia rimarkindaĵo estas tiu pri la uzo de participoj kiel predikativo kiu estas ĉiufoje pli malkomuna, cedante la turnon al pli longaj, sed ankaŭ pli klaraj kaj simple konstrueblaj, propozicioj. Ekzemple: "*Mi vidis lin promenanta kun la hundo.*" Kvankam ĝusta, tiu frazkonstruo ĉiam vekas la



IΦ-Sophia

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

sindemandon pri kiu fakte kuras, ĉar, prenante tiun tipan karakteron elde slavlingvaj sintaksoj, Zamenhof determinis ke la predikativoj rilataj al akuzativo ne ricevus la finajon *-n*, fakto kiu aspektas tute strangan al latin- kaj ĝermanlingvanoj, kiu, por liberigi sin de tiu situacio, ĝenerale preferadis uzi aliajn frazkonstruoj: "*Mi vidis lin, kiam li promenis kun la hundo.*" aŭ "*Li estis promenanta kun la hundo, kiam mi vidis lin.*"

Alia tendenco, vere furoranta dum la 30-aj jaroj estis tiu mallongigi la konjunkcio *kaj*, skribante nur *k* ; simile al multaj interretaj surogatoj uzataj hodiaŭe, tiu tendenco fariĝis ĉiam pli rara post la 2-a Mondmilito kaj, hodiaŭ estas uzataj nur en retroŝtoj k.s., kaj en kelkaj publikigoj de SAT (eĉ en PIV). Tio elmontras, ke ne ĉiam tendenco, malgraŭ furoranta, sukcesas fariĝi konkreta fakto en la lingvo – precipe kiam ĝi ne povas esti elparolata, kiel la konjunkcio *k*, kiu ĉiam estis prononcita *kaj*.

En nuntempaj tekstoj oni klare perceptas ankaŭ la malaperon de du uzeblecoj de la akuzativo: *a)*, por indiki direkton; kaj *b)*, por forigo de prepozicio. En la unua situacio, la Fundamento antaŭvidas tiun eblecon kaj agnoskas ĝian uzon, prezervante la substantiveco de la vorto indikanta la finan direkton; sed, hodiaŭ, la plej uzata maniero estas pere de samtempa adverbigo de tiu vorto.

- *Mi vojaĝos al Parizo.* > *Mi vojaĝos Parizon.* > *Mi*



IΦ-Sophia

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

vojaĝos *Parizen*.

La dua situacio, tio estas, uzado de akuzativa finaĵo por forigi prepozicion, kvankam fundamenta, fakte neniam estis populara rimedo inter la esperantistoj, kaj simple malaperas en la hodiaŭa lingvouzo.

Alia rimarkinda ŝanĝo en Esperanto estis la konstanta malvastigo de uzeblecoj de la prepozicio "je": de sia kvazaŭ ĵokera kondiĉo en la unuaj dekjaroj de nia lingvo, pro sia nedifinita senco, ĝia uzado estas hodiaŭ reduktita preskaŭ nur al tiu de vorto enkonduka por tempaj adverboj.

Alia lingva fenomeno estas ke la uzado de "se" fariĝas pli malofta – fakto nomumita "senseismo" de la unuaj kiuoj perceptis ĝin – aŭ estas anstataŭigo de la konjunkcio "se" por "kaze" aŭ "kiam". Ekzemple: "Se li venus, li farus" > "Kiam li venus, li farus" aŭ "Kaze li venus, li farus." Se ŝi venos, ŝi certe pritraktos tion". > "Kiam ŝi venos, ŝi certe pritraktos tion." aŭ "Kaze ŝi venos, certe pritraktos tion."

Kompreneble, estas nenia "senseisma movado", kaj tio estas nur nekonscia tendenco, certe kaŭzita de la sekvaj kialoj: a) Kontraŭe al Esperanto, okcidentaj lingvoj uzas la konjunkcion "se" – aŭ ĝiaj ekvivalentoj – por enkonduki kaj demandaj kaj kondiĉaj propozicioj⁴. Tio, sumita al la fakto ke la plejmulto de la esperantistoj ne trapasas la bazajn kursojn – kie tiu gramatika punkto ne estas, kaj ne devas esti, instruita – kreas

⁴ Kaj, plej grave, multe da orientaj lingvoj eĉ ne uzas konjunkciojn!



IΦ-Sophia

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

grandajn konfuzojn en granda nombro da esperantistoj. Do, bona devojiĝo el tiu problemo, eĉ rekomendita de kelkaj instruistoj, estas simple anstataŭi "se" por "kaze" aŭ "kiam" (kaj la plej bona estus plibonigon de niaj instrumentoj kaj materialoj).

Tiu anstataŭigo ne estas en si mem erara, krom en frazoj kiel: "*Mi ne scias kaze li venos*". Plie, tute spontanea fenomeno, malfacilas diri kom da "senseistoj" tion faras por manko da sufiĉa disvolviĝo en la idiomo, aŭ por stila sinteno – ĉar en tiu situacio supozeble la parolanto kapablas distingi inter "se" kaj "ĉu".

Kiel vidite, el la tendencoj ĝis nun priskribitaj, neniu el ili kontraŭis la Fundamenton. Ili estis, resume, rezulto de, laŭtempa kaj fluanta, preferado por unu al alia el la rimedoj ebligataj de la Fundamento mem. Tamen, starigita en 1905, la *Fundamento de Esperanto* ne povis antaŭvidi la estontan evoluon de la homaro, de la sciencoj kaj teknologioj, ktp., nek, precipe, la sociajn ŝanĝojn okazintajn tra la tuta mondo dum tiu tempo, kiuj tute transformis tiun de la *belle époque*.

Dank'al tio, multiĝas situacioj kiuj, tute ne antaŭvideblaj en 1905, estis tute prisilentitaj en la Fundamento, sed kiuj hodiaŭ estas en la tagordo. Do la esperantistaro vidas sin antaŭ strangan dilemon: kiel pritrakti temojn ne menciitaj en la Fundamento, kiel solvi tiujn problemojn sen disrompi ĝin? Provante trovi respondon, multaj esperantistoj elturniĝas uzante *preterfundamentaj* solvoj. Tiu

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

situacio disvolviĝas paralele al naturaj ŝanĝoj de la idiomato, kaj, kompreneble, ĉiam ŝokiĝas almenaŭ kun la unua el tiuj supre cititaj sintenoj.

Antaŭ daŭrigi estas konvene klarigi, ke mia intenco tie-ĉi ne estas defendi aŭ ataki nenian el la ŝanĝoj proponitaj/konstatitaj en la hodiaŭa kunvivado inter esperantistoj, sed elmontri ilin laŭ lingvistika vidpunkto kaj, rekonante ilin kiel ja tendencojn, kiuj povos aŭ ne fariĝi dominantaj, depende de la nombrokresko de siaj uzantoj kaj kompreneble de la tempo. En tiu mia laboraĵo, mi ne mencias punktojn kiuj estus kontraŭfundamentaj proponoj – almenaŭ laŭ la dua vidpunkto – sed nur tiaj kiuj oni povos nomigi "preterfundamentajn".

Rilate al tiuj, oni povas facile konstati, escepte en fonologia kampo, oni povas trovi preterfundamentajn solvojn en ĉiu alia lingva nivelo. Kelkaj el ili ne estas viditaj – ankoraŭ almenaŭ – en literaturaj verkoj, nek en informiloj kaj similaĵoj; ili ja estas troveblaj en hejmpaĝoj, blogoj, sociaj retumoj, ktp.; Tamen, konsiderante ke estas komunumo en Facebook kiu havas, hodiaŭ, trifoje pli da membroj ol UEA mem; konsiderante ankoraŭ ke, hodiaŭ, plejmulto el la novbakitaj esperantistoj lernas la lingvon pere de interreto, kaj praktikas ĝin unue en sociaj retumoj kaj babilejoj, kaj nur poste ili aliras (kiam ili aliras) al reala ĉeesto en kluboj, asocioj, aranĝoj, oni devas konsideri ke ili frue kontaktiĝos kun kelkaj



IΦ-Sophia

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

novaj tendencoj, kaj povas, al kutimintaj al ili, fariĝi siajn nekonsciaj divastigantojn, do oni neniel povas preterlasi la eblajn estontajn influojn de tiuj retaj medioj en la ĉiutaga esperanta lingvo.

Sed, eĉ se tiuj elturniĝoj neniam fariĝos kuranta lingvaĵo en la esperantaj grupoj, estas granda ŝanco ke ili restu popularaj inter esperantistoj apartenantaj al kelkaj sociaj grupoj, starigante kelkaj idioletoj en esperanta lingvo. Iamaniere, por lingvisto ili ja estas atentvekaj: por ili mem, por la kialoj por ilia estiĝo, por la ĝustigoj prezentitaj de siaj uzantoj, por la argumentoj poraj kaj kontraŭaj al ili, kaj resume, por ke ili, finfine, pruvas kaj la vivantecon kaj la kreivecon de la idiomato mem.

En sintaksa nivelo, kaj kiel plia konsekvenco de manko de solvoj por la situacioj priskribitaj antaŭe, kiam la demando pri lokoj kaj nomoj estis pritraktita, oni perceptas kreskon en la uzado de "*akuzativa prepozicio na*", kies uzo estas agnoskita antaŭ neesperantigita vorto kiu havas finaĵon kiu malpermesas la markigon pere de *-n*. Tio frekvenca okazas antaŭ neesperantigitaj nomoj de lokoj, personoj, ktp. Ekzemple, en frazo kiel: "*La ĉefurbo de mia Lando Kamboĝo estas Phnom Penh, sed mi neniam vizitis Phnom Penh-on.*", oni rimarkas la uzon de akuzativa finaĵo en neesperantigita vorto. En alia ekzemplo, oni havas, ekzemple: "*Sfax estas tunizia urbo, tamen, mi ne konas Sfax-on*". Pro la dubaj formoj kaj provoj esperantigi nomoj



IΦ-Sophia

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

kiel tiuj, multaj defendas la ideon uzi "na" anstataŭ la akuzativo, do ni havus:

- a) ...*sed mi neniam vizitis na Phnom Penh.*
- b) ... *mi ne konas na Sfax.*

Alia uzebleco, kaj kialo, por *na* estas ke ĝi oportunigas elipson de finaĵo *-on* en poezio kaj en kanzonoj, ekzemplo de tio oni trovas en tekstoj kiel *La haluŝkaĵoj*, de la franca kantisto Guillaume Armide⁵:

Mi fortrinkis na la likvor'
 Formanĝis na la ĉokolad'
 Kaj ĉar vi daŭre estis for
 Mi postkuris na via kat'

Mi malkudris na la kurten'
 Same pri via vestaĵar'
 Pro via daŭra nereven'
 Varmiĝis per via gitar'

REK.

Vi devis ne lasi min
 Sola eĉ sen vartistin'
 Mi faras nur haluŝkaĵojn
 Haluŝkaĵojn malapud vi

Mi zorgis pri via financ'
 Elspezis laŭ mia bonfart'
 Kaj ĉar vi havas na bonŝanc'
 Mi distranĉis na l' kreditkart'

Mi faris en via palac'
 Feston kun la tutamikar'
 Sed ĉar mankis iom da spac'
 Ni forĵetis na la meblar'

⁵ La aŭtoro sincere esprimas sian dankemon al Guillaume Armide, kiu tre ĝentile permesis la publikigon de la paroloj de la du - ĝis nun - ne antaŭ publikitaj kanzonoj.



IΦ-Sophia

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

(REK.)

Vidu la rezulton de
Via sensenca ide'
Mi faras nur haluŝkaĵojn
Haluŝkaĵojn pro l'mank' de vi

Mi bruligis na via PIV
Ĝin adiaŭis per bala'
Blasfemis na l'akuzativ'
Per ced' al uzo na la na

Alia bona ekzemplo pri uzado de la prepozicio "na" oni vidas en ĵus publikita teksto de Christian Declerck *"Itinero rememoriga pri vivo kun esperanta literaturo"*. En iu parto de la teksto, la aŭtoro skribas: *"Mi vizitis Kvinpetalon, posedas na LM, NR, ekzemplerojn de NP, abonis Fonto'n kaj LG, mi kunlaboris ĉefe kun tiu lasta periodaĵo..."* (DECLERCK, 2015:29) En ĝi oni povas rimarki alian ebleco uzi la "prepozicio na", ĉar Declerck ĝin uzas por eviti serion da mallongigoj kiel "LM-on, NR-on, ktp".

Rilate al tiu maniero signaligi la akuzativon, oni devas rimarki, ke, kvankam dispartigo inter vortoj kaj ceteraj elementoj kiuj ĝin konstituas ne estas io antaŭvidata de la Fundamento, nek estis iam praktikata en Esperantujo, tiu "prepozicio na" ekaperas kiel kreivan rimedon por preterpasi vakuon kaj en la Fundamento kaj en ĝiaj sinsekvoj: ĝi ja estas surogato kiu eble neniam fariĝos sufiĉe forta por konkeri lokon en la esperanta gramatiko, sed oni ankaŭ ne povas nei la fakton ke ĝi bone funkcias ene de la sistemo de la idiomo. Eble ĝi

*IΦ-Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

malaperu dum kelkaj jaroj, forlasita de siaj uzantoj, sed plej grave estas ke, antaŭ ol ĝi, malaperu la vakuojn kiu kreas necesojn kiel tiajn.

Sed estas en la morfologia kampo kie ni trovos la plej fortan el la hodiaŭaj tendencoj de esperanta lingvo, ĉar ankrita sur internaciaj sociaj ŝanĝoj. En la mondo de 1905 apenaŭ ekzistis spurojn de la transformoj vivitaj de la mondo rilate al "genra demando": la viktoria mondo, inspirita kaj de religiaj kaj moralaj sintenoj, klare kaj rigide dividadis la homan seksemon inter du genraj klasifikoj, maskla kaj ina, obeante al la biologia sekso. En tempo kiam la batalo por virinaj rajtoj apenaŭ balbutis, neniu povus imagi kiom da revolucioj okazis, dum la lasta jarcento, en ĉi-tiu kampo. Sed, hodiaŭ, en historia momento kiam la virinaj rajtoj estas – almenaŭ laŭleĝe – internacie rekonitaj kaj iel solidigitaj. Oni rimarkas kreskon en la porrajta batalo de samseksemuloj kaj aliaj sociaj grupoj. Tiu kampanjo – ekkomencinta dum la 70-aj jaroj – evoluis en malsimilaj niveloj laŭ diversaj landoj, kulturoj kaj mondregionoj: se en multaj landoj gejoj estas tuj mortigitaj; en aliaj tiu komunumo ĝuas (preskaŭ) plenrajtan egalecon rilate al tradiciaj socigrupoj.

La klara diskutado de la demandoj specifaj por tiu socia grupo estas, en si mem, tiel profunda ŝanĝo en la socia organizo kaj ĝi, kompreneble, kaŭzas grandajn modifojn en la bildo ke unu socio faras el si mem; precipe kiam oni ekdiskutas



IΦ-Sophia

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

pli bazajn konceptojn, kiel difino de familio. Pro tio, en multaj lingvokomunumoj, estas ĝenerala percepto ke la tradicia kuniĝo inter genro kaj sekso ne plu plene spegulas la diversecon nuntempe ekzistantan. Tio afektas, interalie, lingvon – ĉar pere de ĝi homo spegulas sian mondon – kaj konsekvence gramatikon – ĉar ĝi estas la enkodigo de la lingvo. Unu ekzemplo pri tio estas la fakto ke, antaŭ kelkaj jaroj, la Sveda Akademio decidis pri la kreado de tria pronomo, "hen", kiu, kontraŭe al la tradiciaj "han" (li) kaj "hon" (ŝi), ne alportas ian difinon rilate al la genro de la referencato.

Do en diversaj modernaj socioj – kaj ankaŭ Esperantujo estas moderna (mikro)socio – oni perceptas novan ĝeneralan sintenon antaŭ la genroj. Tiu sinteno kondukas al, ĉiufoje pli granda, apartigo inter gramatika genro kaj sekso. Ĝi estas ja esplorinda ĉar, inter ĉiuj tendencoj ĉi menciitaj, ĝi estas tiu kiu alportos pli da konsekvencojn por la strukturo mem de nia lingvo. Ni do esploru ilin:

La Fundamento silentas rilate al genra situacio de vortoj, sed samtempe difinas konstruado de ina formo kaj eĉ prognozas ambaŭseksan formon, kreeblan pere de la jam vidita prefikso *ge-*. Tiamaniere, oni povis konkludi, ke vorto ne havanta la sufikson *-in* - estas ja maskla. Tiu vidpunkto estis konsekrita en la *Plena Analiza Gramatiko*, de Kalocsay kaj Waringhien, kie tekstas ke:

Gramatika genro ne ekzistas en Esperanto. Ĉe la komunaj personnomoj la vira sekso estas nur



IΦ-Sophia

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

negative monstrata; ke *patro* difinas viron, tion ni scias nur, ĉar forestas signo de ineco; oni povas diri, ke la virseksan montras *signo nula*.

Rim.: Tiu sistemo de negativa esprimado de virseksa estas tiel ĝenerala, ke mankas en Esperanto eĉ speciala vorto por signi la mal-inecon. (KALOCSAY; WARINGHIEN, 1980: § 32.A)

Por tio, jam de jardekoj la movado komprenas ke granda kvanto da vortoj ja estas masklaj. Tamen, unu el la konsekvencoj de la supre citita *La Bona Lingvo* estis senkreditigi la verkojn de la duopo Kalocsay kaj Waringhien, forte atakitaj de Piron. Tio malfermis pardonon al aperigo de nova gramatiko, *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*, verkita de Bertilo Wennergren, kiu, iom post-iom, anstataŭis PAG-on kiel referenca gramatiko de Esperanto. Pli moderna – eĉ se, en kelkaj punktoj malpli detala – tiu verko alportas malsimilan difinon rilate al genro:

En Esperanto ne ekzistas gramatika sekso. Sekso estas nur parto de la signifo de iuj o-vortoj. La finaĵo O neniel esprimas sekson.

La signifon de vorto oni ĉiam devas lerni. Por ĉiu besta kaj homa vorto oni devas lerni la eventualan sekson kiel parton de la signifo. Neniaj reguloj decidas pri tio. Regas iom da konfuzo pri tio ĉi, kaj multaj vortoj bedaŭrinde havas neklaran signifon.

Ekzistas en Esperanto tri signifoklasoj de vortoj por homoj kaj bestoj: sekse neŭtraj radikoj, virseksaj radikoj kaj inseksaj radikoj. (WENNERGREN; 2005:41)

Se en la *Plena Analiza Gramatiko* klare tekstas pri la neekzistado de genro, ĉar defininta la sekson genro aŭtomate difiniĝas, oni notu la redifinon farita de Wennergren: ne plu temas pri neekzistado de genro, sed pri neekzistado de sekso



IΦ-Sophia

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

mem. Tio signifas ke, por Wennergren, esperantaj vortoj havas sekson kiel parto de sia semantika ŝarĝo, kaj do ne estas plu necese signaligi ilin pere de sufiksado aŭ ia similaĵo.

Rimarkendas la ŝanĝon pri la genra konceptiĝo en la lingvo: el bildo kie tiu estis morfologie determinita de nula signo, oni transiris al tute nova situacio; en kiu genro estas semantike determinita. Sed tio estos plibone klarigita pere de ekzemploj: se laŭ PAG, triopo kiel *instruisto*, *intruistino*, *geinstruistoj* estis vidita kiel respektive maskla, ina, kaj ambaŭseksa vortoj, laŭ la vidpunkto starigita de PMEG oni povas vidi ĝin kiel neŭtrala, ina kaj ambaŭseksa.

Konsekvence, frazo kiel *La instruisto parolis al la Lernanto*, kiu, je la komenco de la 20-a jarcento, pensigus nin pri du personoj, viro kaj (supozeble) knabo, povas esti, hodiaŭ, je la komenco de la 21-a, interpretata kiel: *Persono kiu instruas* (nedifinita laŭ genro) *parolas al persono kiu lernas* (same nedifinita).

Tamen, se "instruisto" estas semantike neŭtrala, kiamaniere oni rimarkigu, morfologie, la masklan genron? Ĉu sufiĉus la neeston de sufikso *in-* por ke la formo fariĝu tian? Tio ja estos fakta reveno al la antaŭa situacio. Por solvi la novan problemon, kelkaj esperantistoj proponas la enkondukon de nova sufikso indikanta la masklan genron. Tiu sufikso estus -*iĉ*⁶.

6 Tiuj ekde nun vidotaj proponoj estas pliakrigitaj konsekvencoj de la koncepta ŝanĝo starigita en PMEG. Sed oni ne pensu ke Wennergren mem akordas

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

Tiam, revenante al nia antaŭa ekzemplo, oni povas do havi:

a) *La instruisto parolis al la lernanto.* (ambaŭ laŭgenre nedifinitaj)

b) *La instruistino parolis al la lernanto.* (ina instruisto kaj nedifinita lernanto)

c) *La instruistino parolis al la lernantiĉo.* (ina instruisto kaj malina lernanto)

Sed tia koncepta ŝanĝo alportas pliajn novajn modifojn en nia morfologia sistemo: se *instruisto* ja estas (aŭ fariĝas) neŭtrala, do la prefikso *ge-* - kune kun la prefiksaj uzoj de *vir-*, kaj *knab-* - fariĝas siavice arkaika, ĉar la sama ideo povas esti reproduktita pere de la simpla pluralo "*instruistoj*".

La uzado de *-iĉ-* kunportas alian situacion: ĝi devigas ĉiun esperantiston, je la momento uzi ĝin, rezoni ĉu tiu uzo estas vere necesa, ĉar en frazo kiel *Patriĉo kisis la filinon*, la uzo de *-iĉ-* en patro estus tute evitenda, ĉar kompreneble, oni povas pensi, nur viroj povas esti patroj. Tamen, la leĝa sistemo de multaj el tiuj landoj kiuj permesas samseksan edziĝon postulas ke, je adopto de infano, unu el la paro prenu la patran aŭ patrinan rolon; do oni kreas situaciojn kie la patra rolo estas farita de lesbo, aŭ la patrino de gejo. Ĉiukaze la genra funkcio neniel korespondos al la seksa

kun ili.

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

antaŭdifino de la persono. Tiel, oni povos alfronti la jenajn situaciojn:

- *Patriĉo kisis la filinon.* (tiu, kiu havas la patran rolon estas viro kaj negeja homo)

- *Patro kisis la filinon.* (tiu kiu havas la patran rolon povas esti viro, virino, gejo aŭ lesbo, tio tute ne gravas)

Oni eĉ povas pensi ĉu tiuj novaj eblecoj kaj konceptoj de familio – ne plu vidita sole kiel geparo – eble kunportos novajn uzajn por la prefikso *bo-*, sed oni ankoraŭ ne trovis realajn ekzemplojn en la kuranta lingvo.

Sed estas alia situacio devenata de tiuj ŝanĝoj: antaŭ ili, kiel uzi la klasikajn pronomojn *li*, *ŝi* kaj *ĝi*? Tiuj pronomoj, konstruitaj laŭ la identeco inter genro kaj sekso, ne plu reflektas la nuntempan mondon, kie li povus – almenaŭ teorie – esti uzata por paroli pri lesbon, aŭ ŝi por transgenra viro (Oni rememoru ke laŭleĝe ili ja rajtas postuli tiun uzon). Oni unuavide povus pensi pri ĝi kiel taŭga, pure fundamenta, solvo al tiu problemo, sed oni devas rimarki ke eĉ la uzon de ĝi por beboj kaj infanoj neniam estis bone akceptita de la esperantistaro. (Multaj el ni simple rifuzas uzi por bebo la saman pronomon uzotan por hundo. Kaj, oni aldonu, tiu problemo estas tiel antikva kiel la lingvo mem, ĉar Zamenhof mem jam pritraktis ĝin en *Lingvaj Respondoj*.)

Por solvi tiun novan demandon estis proponita novan



IΦ-Sophia

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

trian singularan pronomon, *ri*, uzota kiam oni tute ne volas precizigi la genron de iu ajn. Bona ekzemplo de tiu pronomo estas la kanzono "*Ri Liberas.*", alia komponaĵo de Guillaume Armide, kiu montras al ni kaj la esprimeblecoj atingotaj de *ri*, kaj eĉ pliaj kialoj favoraj al sia uzado:

Trudas al li
 Lia liec'
 Agi, ami laŭ nia opini'
 Trudas al ŝi
 Ŝia ŝiec'
 Ne elekti laŭ sia decidec'
 Ĉu vi scias
 Kiel konduki tiu hom'
 Kiu havas tiun sekson aŭ tiun-ĉi
 En li kaj ŝi
 Enfermitas Veraj homoj laŭ mi
 Enfermitas

REK

Sed *ri* liberas, senkatenas, kaj rajtas estis si mem
 Libere amas kaj ne zorgas ĉu sam- aŭ malsamseksem'
 Libere donas kaj akceptas kaj ne ĝenas rin ia
 dilem'
 Donu al ĉiuj homoj la
 Eblecon eliri
 De li kaj ŝi.

Kompreneble, multaj personoj akuzas tiun pronomon, dirante ke:

a) ĝi estas kontraŭfundamenta (laŭ la dua sinteno ne, sed klare preterfundamenta);

b) ĝi ja estas pleonasma, ĉar ĉiuj ĝiaj funkcioj povas esti plenumitaj de ĝi aŭ alia nedifina pronomo:

- *Ri faru tion* = *Ĝi faru tion* = *Iu el ili faru tion*.



IΦ-Sophia

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

- *Ri ankoraŭ ne venis.* = *Ankoraŭ venis neniu.*

c) ĝia uzo estas pli stila ol lingva demando. Fakte jes, kaj tio percepteblas en frazoj kiel:

- *Mi estis ricevita de la doktoro, kaj ri nenion novan diris al mi.* En kiu, kompreneble la doktoro - neŭtrala vorto! - havas genron, sed tio ne gravas nun.

ĉ) ĝi sonas terure malbela kaj povas konfuziĝi kun *li*. Tiu lasta estas argumento de multaj el la riistoj mem, kiuj serĉas novan formon por la pronomo; kaj estas ĝuste tiu serĉo, kune kun la fakto ke neniu, eĉ la plej modernecaj, instrumentodoj prezentas ĝin, la faktoro kiu iome malfruas la kreskon en la uzado de *ri* en la komuna, ĉiutaga lingvo.

Kompreneble, tiu nuna bildo pri tendencoj en Esperanto estas bildo ankoraŭ en konstruado, kaj la plejmulto el la esperantistoj simple rifuzas ilin - aŭ ĉar ili defendas tiun suprecitita unua sinteno antaŭ la Fundamento - aŭ ĉar simple vidas ilin kiel nenecesaj, aŭ eĉ se necesaj en kelkaj situacioj ne absolute nepraj. Fakte, kiel ĉio ajn en ĉiu ajn lingvo, ĝia postviviĝo dependus unike de la nombrokresko de ties uzantoj.

Tamen mi kredas, ke esperantistoj mem - kaj mi estas unu el ili - devas nek malfermi la okulojn antaŭ ili, ĉar ili ja estas pruvo de la vivanteco de la lingvo, de ĝia supervivado kaj fertileco; nek senpripense, kiel rabiaj hundoj, ilin ataki nome de ia "pureco" de la lingvo. Kontraŭe estas nia devo konstati, ke, ene de ili, estas pli ol simplaj kaj forigendaj

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

"reformismoj", sed vera spegulo de provoj fari la lingvon kapabla respondi al la defiojn alportataj de ĉiamnova mondo. Ni do memorigu la grekan filozofon Herakliton: *pavnta rei~*, tio estas, "ĉio fluas", do estas signo de bonega sano ke nia lingvo tiom fluu.

Bibliografio:

- DECLERCK, Christian. "Itinero rememoriga pri vivo kun esperanta literaturo" in: **La Gazeto** . Metz, vol. 30, num. 175, p. 28-31, jan-feb. 2015
- KALOCSAY, K; WARINGHIEN, G. **Plena Analiza Gramatiko de Esperanto**. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1980
- SEPPIK, Henrik. **La Tuta Esperanto - Gramatiko por progresintoj, gvidilo por kursestroj** . Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio. 1984 [1937].
- WENNERGREN, Bertilo. **Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko** . El Cerrito: Esperanto-Ligo de Norda Ameriko, 2005
- ZAMENHOF, L. L. **Lingvaj Respondoj** . Tyresö: Inko, 2001.
- ZAMENHOF, L. L. **Fundamento de Esperanto**. (Alportugaligita de Túlio Flores) Braziljo: Brazila Esperanto-Ligo, 2015